

## & Gala epistolo:

< Rekante 27 el 53 batoj por strofo, entute 371 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Nikolao Hohlov (La tajdo, 1928). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:53> (

/mimi fami mire redo doTi Ti La; mimi mire mifa soso soso so; mimi fami mire redo doTi Ti La; dodo doLa dodo doTi TiLa La;

(#Rekantaĵo: mimi mi fa mimi mire re do do La; mimi mi fami mi mire re do do Ti; mimi mi fa mimi mire re do do La)

)×7 )+

### (& Strofoj:

'1 /Morgaŭ vi alvenos pompe, por ŝin preni ; Kaj en falsa digno gvidi al altar', ; Kaj per abomena via kis' veneni ; Delikatan buŝon -- fonton de l' nektar'.

(×: **Premu min forte al via varma brusto ; Dolĉan sopiras mi vian lipan guston ; Premu min forte al via varma brusto.**)

'2 Morgaŭ oni poze, kun nobelaj gestoj, ; Vin gratulos, flatos burĝe kaj sen fin', ; El la sinjorinoj en dekoltaĵ vestoj ; Multaj nur envios, tre envios ŝin. ....

'3 Longe mi rigardis vian invitilon ; Sur papero silka, kun orita rand', ; Kiu arlekene fanfaronan brilon ; Disreklamis kun la parvenua frand'. ....

'4 Sed mi ĝin amare ĵetis en kamenon, ; Kun kompat' al ŝia estingita kor', ; Kaj al vi emfaze sendis fi-malbenon: ; Kelkajn virajn vortojn, galajn, tra stertor'. ....

'5 Nur semajno pasis, kiam en la tremo ; Ŝi min ĉirkaŭprenis, kun infana lisp', ; Dum volupta ardo, kvazaŭ diademo ; Kronis ŝian kapon supra hara krisp'. ....

'6 Ho, ŝi estis dolĉo kaj fandita belo, ; Kiam sinforgese dronis en la ĝu' ; La pasiaj lumoj -- fulmoj de l' ĉielo ; Sparkis kaj radiis tra l' okula blu'. ....

'7 ; Nun ŝi estos via ... Ha ha ha!!!  
Kadavron ; Vi aĉetas, rano, per marĉanda mon'! ; Vi imitas bufē novan Minotaŭron, ; Sed ne via estas de la am' burĝon'. .... )